



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 1 No. 4

Official Organ of the Esperanto League for North America

November, 1953

DEC. 15 TAGO DE LA LIBRO TAGO DE SUBTENO AL ELNA

Denove ni proksimiĝas al la feliĉa sezono de festoj. Kiel Esperantistoj, ni anticipas speciale la 15-an de decembro—la naskiĝtagon de la fondinto de Esperanto, D-ro Zamenhof. Tradicie



D-ro L. L. Zamenhof

en niaj rondoĵoj, tiu estas la "tago de la libro", kiun niaj samideanoj festas per la aĉeto kaj interdonado de Esperantaj libroj. Ni rekomendas al vi la bonegajn librojn menciitajn en la reklamo sur la lasta paĝo. Kiam vi aĉetas librojn, vi ne nur havigas al vi la plezuron ilin legi, sed vi subtenas la eldonejojn, kiuj publikigis la librojn; do ebligas la pilgrandigon de nia literaturo.

THE FACT OF ESPERANTO

The present status of the Esperanto movement, as far as public acceptance is concerned, can be described very nicely by means of a story which appeared some months ago in an international periodical. It seems the board of directors of a large company was meeting, and the president made the following statement: "Gentlemen, I have wonderful news! Our research department has developed a revolutionary new method of production. In the six months since we began using this method our costs have been cut in half, sales have doubled, and we are now in a position to declare the largest dividend in the history of our company." Amid the ensuing applause, however, one gentleman rose and said warily, "This new method may be fine in practice, but how does it work out in theory?"

Supporters of Esperanto are not proposing a *theory* for breaking down the world's language barriers, but rather are pointing out that the language problem *has* already been solved—that what we are trying to do is extend the use of the international language beyond its present limited scope to in-

clude ever-widening fields of international activity.

There have been many *proposals* for a universal interlanguage—they number in the hundreds. Many are as ridiculous as the recent suggestion that English, spelled with Russian letters, be adopted by all nations. Others are carefully worked-out projects with much in their favor from a strictly scientific point of view; the latest of these, a project years in preparation and which represents the efforts of a great many well-known and competent men, is *Interlingua*. The *Interlingua* project was launched with a great deal of costly promotion. Yet, as reported elsewhere in this issue, *Interlingua* seems already, for all practical purposes, to be a dead issue. The reason why Esperanto has succeeded while the *Interlinguas*, the *Novials* and the *Mundilatins* have failed will be the subject of an article in a later issue. In a word, just as it "takes a heap of living to make a home," it takes a lot of using to make a language.

Esperanto ceased to be a project 50 years ago; it has become the living language of a living people. We have our own literature, our own periodicals, our own social life. There is no question as to whether or not Esperanto will "succeed" or "fail"; there is only the question of whether the ease with which we are able to exchange ideas with our fellows throughout the world will be shared by the businessmen and the scientists, the diplomats and the politicians, the working men and the students of all countries.

Laŭ propono de unu el niaj membroj, la Estraro deklaris la 15-an de decembro ankaŭ *donacagon al ELNA* kaj invitas la membrojn fari specialajn kontribuojn al nia kaso. La diversaj agadoj de la Ligo kostas monon (kiel vi ja scias!) kaj la sukcesoj de niaj klopodoj dependas grandparte je la amplekso de nia kaso. Do memoru la 15-an de decembro—la tagon de la libro, *donacagon al ELNA*.

Published in Tacoma, Wash., by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ. Subscription free to members. Other rates:

NON-MEMBERS: \$1.75 per year.

GIFT SUBSCRIPTIONS: *Members* may purchase gift subscriptions, at 30 cents per year, for public schools, libraries, eminent persons, etc. The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.

EXTRA COPIES (must be ordered before printing): 30 of one issue for \$1.00 *to members only*.

OFFICERS OF ELNA

President
Gilbert Nickel
204 Harding Avenue
Silview 4, Delaware

Vice-President
John L. Lewine
52 Riverside Drive
New York 4, New York

General Secretary
Louis Dormont
123 East 35th St.
Brooklyn 3, New York
Tel. BU. 4—0963

Chairman, Executive Board
Ferd. Carlson
2116 North 35th St.
Seattle 3, Washington

Committee on Organization:
Armin F. Doneis
Box 105
Pharr, Texas.

Committee on Education:
W.G. Adams
Kingston, Washington.

Committee on Finance:
John Bovit
132 East Broad Street
Westfield, New Jersey.

Committee on Publicity:
D.B. Richardson
6205 South Prospect
Tacoma, Washington.

DECISIONS of the Estraro

1. That the August number of the Review be sent to the full mailing list.

2. Pending acceptance of ELNA as *Landa Asocio* in UEA, with right to name Delegates, we request all members who are willing to serve as Delegates to notify us, so that we may offer the services of active *samideanoj* as an auxiliary to the present inadequate *Delegitaro*.

3. That we name S-ano Dormont to serve as General Secretary until the election in 1954.

4. That no further anonymous members are to be accepted in ELNA, but that present anonymous members may retain that status until the Congress in 1954.

5. That the resignation of Estraro member Robert Karlson be accepted.

6. That \$100 be provided for publication of the November Review.

7. That the Editor be authorized to use part of this money for purchase of printing equipment.

8. That the Review be published bi-monthly through 1954, at an estimated cost of \$50 per issue.

9. That we discontinue subscription to the British Esperantist, the savings to be used for our own publication.

10. That *Informiloj* be published only when needed, and need not be printed.

11. That we suggest that the best way to observe *Zamenhoftago* (Dec. 15) would be by special donations to ELNA to carry on the great work launched by Dr. Zamenhof.

12. That S-ano Richardson, Acting Editor, be named Editor.

13. That we accept the resignation of S-ano Richardson from the Estraro.

14. That we print 10,000 copies of the UN petition, with an added paragraph asking support of our government for the petition.

15. That non-members be allowed to subscribe to the Review for \$1.75 per year.

16. That members may purchase gift subscriptions at 30 cents per year for public institutions, eminent personages, etc., but not for persons who should be expected to pay the higher rate.

17. That members may purchase extra copies, at 30 for \$1.00, if ordered in advance.

RULINGS

by the President

Rulings by the President are to be considered as approved by the Estraro unless and until contrary action is noted.

I. The President rules on all Constitutional questions. His decisions are presented to the Executive Board. The Board may overrule his decisions. All rulings, and decisions of the Board on the rulings, shall be published to the membership and be subject to referendum as previously provided for all decisions of the Board.

2. The position of Financial Secretary is vacant and should be filled by the Executive Board until the 1954 Congress, at which time the position should be filled for three years by the membership.

3. George Wagner is, by vote of the Executive Board, elected to the Executive Board until the 1954 Congress, at which time the members will elect for one year, as Mrs. Zetterlund's term would have expired in 1955.

4. The Nominating Committee for the 1954 Congress shall arrange balloting to fill the vacancies that will occur at that time in the Executive Board by expiration of the terms of S-anoj Bovit, Doneis and Richardson, for 3 years each.

5. The Nominating Committee for the 1954 Congress shall arrange balloting for President (for 2 years), for General Secretary (2 years), for Treasurer (1 year), and for Financial Secretary (3 years).

6. The Executive Board shall fill for one year the positions of (a) General Secretary and (b) Treasurer.

7. The Executive Board shall fill for the remainder of the Congress year the Executive Board positions vacated by the resignations of S-anoj Karlson and Richardson. By balloting of the members in 1954, a successor shall be elected for S-ano Karlson for 2 years, and for S-ano Richardson for 3 years.



When you pass an old book store, walk in and ask if they have any Esperanto books. Quite often you may find useful and hard-to-get books at very reasonable prices.

38-A KONGRESO DE UEA

(*Laŭ Heroldo de Esperanto*)

La 38-a Universala Kongreso de la U.E.A., kiu okazis en Zagreb, Jugoslavio, dum la lasta semajno en julio, estis—laŭ la raportoj, kiujn ni ricevis (tro malfrue por la aŭgusta *Revuo*)—unu el la plej grandaj kaj la plej sukcesaj. Aniĝis 1760 personoj el 30 landoj. La kutima arango de la postmilitaj jaroj estis sekvita, inkluzive de la *interkonatiga vespero*, la *solena malfermo*, katolika kaj protestanta *diservoj*, *arta vespero*, la *kongresa balo*, kaj plurspecaj labor-kunsidoj. Speciale interesa estas la fakto, ke almenaŭ du el la jugoslavaj oficialuloj, kiuj ĉeestis partojn de la kongresaj agadoj, paroladis en Esperanto. Ankaŭ signifa estis la ĉeesto de oficiala observanto de Unesko, kiu alparolis la Kongreson. La festparoladon faris D-ro Edmond Privat, kiu paren-teze festas en ĉi tiu jaro sian oran jubileon kiel Esperantisto.

Dum la semajno oni kun taŭga ceremonio inaŭguris Zagreban straton kiel "Zamenof-Strato".

Unu nova ero en la Kongresa programo ŝajne trovis favoron: la Akademio de Esperanto, prezidata de S-ro J. Isbrucker, kunsidis publike por diskuti lingvajn temojn de ĝenerala intereso.

Ĉe la Ferma Kunsido i.a. oni: anoncis la rezultojn de la balotado pri Estraranoj; raportis pri la laboro de la Komitato de U.E.A. en la pasinta jaro; sciigis la rezultojn de la oratora kaj belartaj konkursoj; kaj akceptis la sekvantan rezolucion:

"La 38-a Universala Kongreso de Esperanto apelacias al la naciaj kaj internaciaj oficialaj instancoj, serioze konsideri la praktikan valoron de Esperanto kiel internacia komprenilo. Kun kontento ni registris la intereson pri Esperanto de Unesko, kiu al la Zagreba Kongreso sendis observanton. Ni atendas, ke la koncernaj aŭtoritatoj en la diversaj membroŝtatoj de Unesko plej detale kaj sen antaŭjuĝo esploru la jam atingitajn rezultojn kaj la eblecojn de la lingvo, kaj ke ili faru al Unesko konkretajn proponojn por la utiligo de ĉi tiu plej valora kaj praktika solvo de la monda lingvo-problemo."

Antaŭ ol fermi la 38-an, samideano el Nederlando invitis la 39-an Universalan Kongreson al Haarlem; kaj tiam, post kantado de "La Espero", la Kongreson oni deklaris fermita.

Kongresaj arangoj estis sub la lerta gvidado de la Konstanta Kongresa Sekretario, nia ŝatata samideano Mason Stuttard; kaj la Loka Kongresa Komitato, kies prezidanto estis D-ro Ivo Borovėčki.



Mason Stuttard
Konstanta Kongresa Sekretario

26-a SAT-Kongreso

(*Laŭ Heroldo de Esperanto*)

La 26-a Kongreso de SAT okazis la 25- ĝis 31-an de julio en Sheffield, Anglujo. Ĉeestis 190 membroj kaj amikoj de SAT laborplenan kongreson kaj tut-semajnan kunvivadon.

La gvidrezolucio tekstis i.a.:

"La Kongreso...rekonfirmas, ke la praktikado de Esperanto por konkretaj taskoj kaj celoj estas la plej bona pruvilo pri la fakta valoro de Esperanto, sekve la plej taŭga maniero de propagando.

... La agado de SAT trovas sian pravigon en la tutmonda evoluo, kiu tendencas ekonomie kaj politike al unueco, sed ignoras la lingvan problemon, aŭ... rekomendas imperisman, neneŭtralecan solvon, kiu havas nenian ŝancon kontentigi racie kaj sennaciece pensantajn homojn.

La Kongreso... vokas al ĉiuj SAT-anoj daŭrigi sian kulturenan kaj eduk-

BEA Correspondence Course

As announced in the August issue, ELNA has made arrangements to make available in the North American countries the very excellent correspondence course of the British Esperanto Association. We wish to clarify that the price quoted (\$4.50) includes membership in the Esperanto League. The price for the course alone is \$1.50.

Those interested should apply to: Louis Dormont, Secretary, E. L. N. A., 123 East 35th St., Brooklyn 3, N. Y.



Animsoifo

El la libro "Kvaropo"

Mi soifis komprenemon
Por ekspliki la problemon
De la celo kaj signifo
De la vivo. La soifo
Longe, longe min turmentis...
La ĉielo nur silentis.

Sur la teron mi min ĵetis,
Mian vangon tien metis,
Kie nudis la terbrusto
Sub ombranta laŭr-arbusto:
Eble estus, ke la humo
Flustros pri sopirplenumo.

Tiam prenis la patrino
La infanon al la sino.
La venteto lulmurmuris,
Kaj folioj lulsusuris;
Pasis for la animŝtormo,
Kaj min trafis paca dormo.

John S. Dinwoodie



laboron kaj krei kontaktojn novajn kaj konservi kontaktojn malnovajn kun samideaj amikoj en kiel eble plej multe da landoj kaj regionoj de la terglobo, eĉ tie kie nia movado ne estas tolerata kaj estas persekutata de la regantoj. Tiamaniere ili kuraĝigas la trafajn kamaradojn por elteni ĝis la momento, en kiu falos la nunaj malhelpaĵoj kaj ili ree povos aliĝi libere al nia organizo."

Kvin prelegoj tuŝis plej diversajn temojn: oni aŭdis pri sindikata kaj kooperativa movadoj, pri Racio kaj Mistiko, pri la ideo en la verkoj de Romain Rolland, pri Sennaciismo kaj Belamiismo, pri Islanda socia kaj kultura evoluo.

ESPERANTO ★ TUTMONDE

laŭ arango kun HEROLDO DE ESPERANTO

6-a Aŭstria Esperanto-Kongreso kaj Antaŭkongreso en Klagenfurt.

En la tagoj de la 22-a ĝis 24-a de julio okazis en Klagenfurt, ĉefurbo de Karintio, la 6-a Aŭstria Esperanto-Kongreso; samtempe por la vojaĝantoj al la 38-a Univerŝala Kongreso estis aranĝita Internacia Esperantista Renkontiĝo. Jam la antaŭan tagon la Loka Komitato (prez. dir. L. Schmid, vicprez. dir. Watzinger, sekr.-kas. s-ano Dürschmid) povis saluti la unuan centon da alvenintaj gesamideanoj.

La kongresprogramo de la unua tago prezentis al la partoprenantoj viziton de urbaj vidindaĵoj, motorboatan rondveturon sur la ĉarma lago de Wörth kun vizito de la konata banloko Velden. Vespere oni renkontiĝis por „interkona vespero“.

La 23-an de julio, post katolika deservo kun esperantlingva prediko de P. Pio Lenz, okazis solena malferma kunsido, kiun ĉeestis ĉ. 300 esperantistoj kaj honor gastoj. La kongreson malfermis per rekonaj kaj honorigaj vortoj la estro de la Karintia registaro s-ro Ferdinand Wedenig; sekvis alparoloj de reprezentantoj de ekleziaj kaj civilaj aŭtoritatoj, kaj de en- kaj eksterlandaj esperantistoj. Festparoladon faris s-ano eksministro D-ro ing. H. Frenzel, prez. de Aŭstria Esperantista Federacio, menciante la gravan rolon de Esperanto por interkompreniĝo en la nuna tempo, kiam jam UNO pere de sia Unesko-sekcio interesiĝas pri nia movado. Oni multe aplaudis la sciigon de urbestro Peter Graf, ke la urbestroaro decidis doni al strato en nove-konstruata kvartalo la nomon „*Esperanto-Strasse*“, kaj la skriban sciigon de ĝen. poŝtdirektoro Dworschak, ke la aŭstria poŝtadministracio eldonos en 1954 novan *Esperanto-poŝtmarkon* honore al la 50-jara ekzisto de la aŭstria Esperanto-movado.

Dum la lasta kongrestago okazis ĝenerala kunveno de Aŭstria Esperantista Federacio kun kutima tagordo. Gravaj deĵoraj kaŭzoj devigis la ĝisnunan multjaran prezidanton remeti sian funkcion. Li estis elektata honora prezidanto. La nova estraro konsistas el ges-anoj Paul Glüxmann, prez.; oficeja konsil. R. Cech, afergvidanta AEF-estro; Maria Loibel, kas.; Alfred Berdan, sekr.

Posttagmeze la aŭstraj esperantistoj kaj pli ol 50 eksterlandaj gesamideanoj forveturis en speciala fervoja vagono al Zagreb.

La ĉi-jara Aŭstria Kongreso estis granda sukceso. Menciinde estas ankoraŭ, ke la aŭstria poŝto konsentis la uzon de speciala poŝta stampo.

(Mallongigita laŭ raporto de R. C.)

„La plej suda Esperanto-Kongreso“

nomas „Argentina Esperantisto“ la 7-an Argentinan Kongreson de Esperanto, kiu okazis la 2-4 aprilo en la urbo Bahia Blanca, preskaŭ ĉe la 40-a suda latitudo. Ĝi estis malfermita en ĉeesto de la urbestro. Dum ĝi la lokaj ĵurnaloj publikigis 20 artikolojn pri Esperanto, kaj ankaŭ la radio disaŭdigis novaĵojn pri ĝi. Komence de la malferma kunveno oni senvualigis buston de Zamenhof, skulptitan de s-ano Enzo Redolfi. Oni elektis novan komitaton de Argentina Esperanto-Ligo: prez. E. Iglesias, vicprez. Prof. J. Hansen kaj Prof. E. Balesch, ĝen. sekr. Floreal Villar, kas. L. Vicino, kaj sep aliaj anoj.

Prepore por 1954.

Venontan jaron okazos en Montevideo, la ĉefurbo de Urugvajo, la Konferenco de Unesko, kiu devos okupi sin interalie pri Esperanto. Pro tio estas tre ĝojige legi en raporto el Urugvajo pri la preparlaboroj farataj, kaj parte jam faritaj, de niaj tieaj samideanoj, por ke la Unesko-konferencanoj ricevu pri nia afero kiel eble plej kompletan kaj kiel eble plej favoran impreson. Interalie ili projektas la arangon de granda Esperanto-ekspozicio. Jen kion oni al ni raportis:

Urugvajna Esperanto-Societo (UES) jam faris ĉiujn paŝojn por *Esperanto kaj Unesko* ĉe la loka koncerna Komisiono, al kiu ĝi havigis detalan raporton kaj kompletigajn sciigojn. La agado de nia prezidanto, Profeso Fernández Menéndez, meritas varman agnoskon kaj dankon por lia konstanta kaj streĉa laboro en la klopodoj tiukoncerne. Grandan ekspozicion deziras okazigi UES je la Unesko-Konferenco en 1954, kaj jam valora materialo estas ricevita de pluraj naciaj societoj; sed lastmomente la Centro de Esploro kaj Dokumentado anoncis, ke ĝi surprizen tiun grandiozan laboron, ĉe kiu UES donos planan kunlaboron.

Usona ambasadorino en Svislando pri la utileco de internacia lingvo.

La nova ambasadorino de Usono en Svislando, f-ino Frances Elizabeth Willis, transdonis la 9-an de oktobro sian atestilon al la Prezidanto de la Svisa Federacio. Poste ŝi akceptis la svisajn ĵurnalistojn por gazetara konferenco. Respondante diversajn demandojn, ŝi tuŝis ankaŭ la problemon de la internacia lingvo, kiun iu ĵurnalisto aludis.

Ŝi diris, ke la malfacileco koncerne komunan duan lingvon konsistas en tio, ke ĝis nun la diversaj landoj ne povis interkonsenti pri la elekto de iu lingvo kiel komuna lingvo, ĉu nacia, ĉu morta, ĉu artefarita lingvo, sed ke laŭ ŝia opinio la akcepto de dua lingvo, kiu en ĉiuj lernejoj de la mondo estus instruata al la infanoj, estus ege utila afero. „Ĉiukaze, se ekzistus tia lingvo ĝenerale akceptita, ĝi estus ŝpiranta al mi multe da malfacilaĵoj,“ diris la diplomatino, kiu pasigis 25 jarojn de sia vivo en usonaj legacioj de diversaj eŭropaj landoj.

250 japanaj esperantistoj kunvenis en Okayama.

La 40-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis de la 19-a ĝis 21-a de septembro en Okayama, kiu vidis en 1906 la unuan organizitan Esperanto-movadon en Japanujo, kiam kimra samideano E. Gauntlet organizis korespondan kurson. Salutis la kongreson D-ro Miki, guberniestro de Okayama, en Esperanto.

Vicprezidanto de departemento de Unesko aprobas Esperanton.

Federacio de Unesko-Asocioj en Japanujo aranĝis la 1-an de oktobro en sia oficejo specialan kunsidon por paroli kun Prof. *Frem Nath Kirpal*, vicprezidanto de Kulturaj Aktivecoj de Unesko, kiu nun vizitas Tokion. S-ro *Mijake-Sihei*, direktoro de Japana Esperanto-Instituto kaj de la Centra Komisiono de l' nomita Federacio, grava privata organizo kun pli ol 100 membroj-asocioj, parolis je tiu okazo pri la lingva problemoj en la internaciaj intelektaj kunlaboroj, kaj petis s-ron Kirpal, ke li koseru la aferon kiel ne-eŭropano (li estas hindio) pli penetre ol aliaj kaj donu apogon al ni en la Unesko-sekretariejo.

Responde al li, s-ro Kirpal informis, ke la afero koncernas lian departementon, ke Unesko transprenis de Unio petskribon kun subskribo de milionoj, ke oni faris rezolucion en Parizo kaj, laŭ ĝi, Unesko aranĝis enketon, petante informojn de siaj membroj-ŝtatoj, kaj ke ĝi sendis observanton al la Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, — ĉio faktoj jam bone konataj al ni, esperantistoj, kaj ankaŭ al s-ro *Mijake-Sihei*. S-ro Kirpal opinias, ke la solvo estas malfacila, tamen li *persone aprobas teorie Esperanton*. Li demandis s-ron *Mijake* pri la nombro de Esperanto-parolantoj en Japanujo. La respondo de s-ro *Mijake* kompletigis la reprezentanto de la Federacio de Unesko-Aktivecoj de Studentoj en Japanujo, dirante ke en preskaŭ ĉiuj universitatoj de Japanujo troviĝas Esperanto-rondoj. Kaj s-ro *K. Suzuki*, ĝenerala sekretario de Japana Unesko-Komisiono, raportis, ke la japana registaro sendis al la Unesko-centro informojn pri la japana Esperanto-movado redaktitajn senmodife laŭ la raporto prezentita de Japana Esperanto-Instituto.

Rektoro de Universitato de Tokio rekomendas lernadon de Esperanto.

Ne pli frue ol nun ni sciigis, ke en la numero de la 1-a de majo 1953, de „News“ de la Societo de Poŝtamikoj, organizo de junaj korespondemuloj kun 400.000 membroj (!), aperis intervjuo de ĝiaj membroj (lernantoj de duagradaj lernejoj) kun Prof. *T. Yanaibara*, rektoro de la Universitato de Tokio. En ĝi la rektoro konsilas al la junaj lernantoj, lerni Esperanton por korespondi kun plumamikoj en Eŭropo kaj Sudameriko. Li diris interalie: „*Korespondante per Esperanto vi ne havos lingvan handikapon, kaj vi ne bezonos humiliĝi antaŭ okcidentanoj.*“ Post tiu intervjuo la oficistoj de la societo komencis lerni Esperanton, organizante kurson en sia-sidejo en la Ministerio de PTT.

Noktomeze en brila sunlumo. Jarkunveno de NEL en Narvik.

Norvega Esperantista Ligo okazigis ĉi-jare sian jarkunvenon en Narvik la 4-an kaj 5-an de julio. Tio estis la unua fojo ke la jarkunveno okazis en la malproksima norda parto de la lando. Tamen partoprenis inter 50 kaj 60 membroj; la reprezentantoj el suda Norvegujo havis 2-tagan streĉan vojaĝon por atingi de sia hejmloko la kongresurbon.

La kunvenon aranĝis la Nord-Norvega Distrikta Organizaĵo de NEL sub gvidado de sia energia prezidanto, s-ro Georg Rokkan, en kies bela nova hejmo okazis interkonatiga vespero. En la tagordo de la kunveno oni diskutis jarraporton kaj jarbilancon 1952, starigon de kursoj kaj kluboj en novaj lokoj kaj la eternan problemon, kiel membrigi la kursanojn. Diskutinte kelkajn internajn aferojn, oni transiris al la elektoj, kiuj rezultis jene: prez. C. Stöp-Bowitz; vicprez. Olav Rygg; ĝen. sekr. Alfred Skyberg; sekr. Jan Ekhaugen; kas. John Selbekk; estraranoj: f-ino L. Fischer, S. Brant-saeter, R. Rian, G. Rokkan, O. Thormodsen. Oni konfirmis reelekton de R. Bugge Paulsen kiel komitatano de UEA kun C. Stöp-Bowitz, K. Sellin kaj O. Thormodsen kiel liaj anstataŭantoj.

Dum bela sabatvespera festeno en brila noktomeza suno la Ordena Kolegio dekoraciis r-ron Georg Rokkan kaj s-inon Madeleine Haudebine per la ordeno de NEL „Pro Merito”. La plensukcesa kaj harmonia kunveno finiĝis per ŝipekskurso sur la fjordo.

Dum la posta semajno la prezidantoj de NEL (Stöp-Bowitz) kaj de Nord-Norvega Distrikto (Rokkan) kun grupo da sudnorvegaj samideanoj faris rondvojaĝon al la ĉeĉeraj nordnorvegaj Esperanto-kluboj, en Tromsø (kunveno kaj noktomeza ekskurso en brila sunlumo, 5-hora aŭtobusveturo rekondukis nin al Narvik por lome de la ripozo. La sekvintan tagon oni enaŭtobusigis je la 6-a matene kaj atingis Bodø post 11-hora veturo. La rondvojaĝo, kiu finiĝis en Trondhejmo, havis du celojn: vizito (por la sudnorvegaj) al la lando de la noktomeza suno, kaj stimulo al la nordnorvegaj Esperanto-kluboj per nia vizito. Pro la neimag-eble grandaj distancoj en la nordo tiuj kluboj tro malofte havas viziton de fremdaj esperantistoj. Sed la grandioza naturo, la noktomeza suno kaj la afableco kaj gastameco de la homoj tie, kaj precipe de la esperantistoj, meritis grandamasan vizitadon al la Norda Norvegujo.

C. STÖP-BOWITZ.

(Iom mallongigita.)

Italaj gesamideanoj jubilee kongresis en Como.

En la nekompereble bela kadro de la Lago de Como (pr. Komo), kie edziĝis industrio kaj naturo beleco, okazis de la 5-a ĝis la 9-a de septembro la 25-a Itala Kongreso de Esperanto. Partoprenis ĝin pli ol 500 gesamideanoj, inter kiuj (la unuan fojon en la Esperanto-movado) 31 el la insulo Sardinio kaj, kiel ĉe la antaŭa kongreso en Bologna, preskaŭ cento da eksterlandanoj el 12 nacioj: hispanoj, svedoj, jugoslavoj, danoj, finnoj ktp.

14-a Hispana Kongreso en Bilbao sukcesis lau ĉiuj vidpunktoj.

De la 7-a ĝis 10-a de aŭgusto okazis en Bilbao kun pli ol 400 partoprenantoj la tria postmilita kongreso de niaj transpireneaj samideanoj. Inter la kongresanoj estis tri-deko da eksterlandanoj. Mi mem, franca samideano, ĉeestis kiel fremda gastano en tiu brilega manifestacio.

Vendredon matene (la 7-an) komenciĝis la kongreso per interkonatiga kunveno. Tuj poste okazis la oficiala akcepto de la tuta kongresanaro en la belega araba salono de la urbodomo, kie la urbestro faris tre afablan paroladeton. Posttagmeze estis la oficiala malferma kunveno, kun multaj salutoj kaj viglaj diskutoj, sudlande pasiaj, pri multaj temoj sed ĉiam en Esperanto.

La pasintan matenon daŭris la diskutoj, sed malgraŭ la pasia vigleco neniel disrompiĝis la frateca, vere samideanea atmosfero. Interesaj raportoj pri la esperantista aktiveco montris la rapidan kreskadon de nia movado en Hispanujo. Malgraŭ monmanko niaj hispanaj samideanoj antaŭenirigas nian aferon laŭ multaj rilatoj: presado (ĉefe vortaroj), gazetoj, radio ktp. Ili agas kunlabore, kaj ili tre bone parolas, eĉ komencantoj.

Specialan elsendon aranĝis Radio Bilbao, ĉe kies mikrofono kvin eksterlandaj esperantistoj estis intervjuataj. Sabatona vespere okazis interesa literatura vespero.

Sed apud tiel efika laboro estis ankaŭ memorindaj distraj programoj: duontaga ŝipekskurso al la maro kun vizito al la alt-fornoj de Baracaldó kaj al la ĉarma bankloko Portugalete, prezentado de baskaj dancoj antaŭ la meso ĉe Nia Sinjorino de Begoña, abunda bankedo en kadro de mirinda pejzaĝo, kaj fine la tuttaga aŭtobusa ekskurso al la plej belaj lokoj de la baska marbordo, al Guernica kaj al urbeto Eibar, en kies urbodomo okazis, sub prezido de la tiea urbestro, la festa ferma kunveno.

Al la admirindaj klopodoj de niaj hispanaj geamikoj ni deziru plene merititan sukceson.

DANIEL LUEZ.

Esperantista junularo kongresis.

Kiu esperantisto ankoraŭ ne aŭdis pri Wörgl? Ĉiu ja scias, ke pasintjare oni inaŭguris tie belan Zamenhof-monumenton. Dum aŭgusto 1953 denove multaj esperantistoj vojaĝis al Wörgl por pasigi kelkajn tagojn en la agrabla sfero de Esperantujo, okaze de la 9-a Kongreso de TEJO.

Antaŭ la oficiala malfermo la junularo metis florkronon ĉe la monumento de la majstro. La urbanoj, kiuj pasintjare ankoraŭ ne plene komprenis la sencnon de la starigo de la monumento (kaj la iniciatinto, s-ro Hans Steiner, devis venki multajn malfacilaĵojn por ricevi la necesajn permeson kaj monon), nun povis konvinkiĝi pri la valoro de Esperanto. Neniam antaŭe ili spertis ion similan. Fraŭlino el Aŭstralio libere parolis kun svedoj, hungaroj, danoj, angloj, germanoj; infanoj el Maroko senĝene ludis kun aŭstraj kaj anglaj infanoj; franco babilis kun germanino; neniu konis lingvajn barojn. Esperantlingvaj babilado kaj kantado resonis sur la stratoj.

Okazis esperantlingva diservo (katolika) kun prediko de kaplano Kaps, belaj eks-

kursoj, Tirola Vespero kaj Internacia Balo. La loĝantoj de Wörgl partoprenis diversajn aranĝojn, kaj multaj el ili promesis baldaŭ lerni Esperanton, por ke ili povu estonte kontakti kun la esperantistaro. S-ro Williams el Anglujo faris kolorfilmon pri la diversaj okazintaĵoj.

Dum la ĝenerala jarkunveno oni pridiskutis organizajn aferojn, la eblecon enŝalti la jam ekzistantajn junulargrupiĝojn esperantistajn en TEJO, kaj ankaŭ la kontakto, kun la diversaj landoj havis la atenton de la kongresanoj.

La grandan laboron de la kongrespreparo faris f-ino Kainer, urba oficistino, kaj s-ro Hans Steiner. La kongreson gvidis s-ino Burgler el Geleen (Nederlando).

Federalistaj kunvenoj.

Fine de aŭgusto okazis en la dana parlamentejo Christiansborg en Kopenhago la 5-a Mondkongreso de la movado por mondregistaro (t.e. la mondfederalista movado), sub prezido de gen. H. Riiser-Larsen. Samtempe havis lokon la 3-a Konferenco de la mondfederalista movado inter parlamentanoj. Kaj antaŭ tiuj du okazis Kongreso de la junulara movado de mondfederalistoj.

La kongresa laboro estis dividita en diversaj komisionoj. Unu komisiono ellaboris planon por la estonta laboro. Tiu plano concernas la aranĝon de kursoj (seminarioj), de konferencoj kaj publikaj kunvenoj kun prelegoj de konataj personoj, intensigo de la laboro en gazetoj kaj radio, organizon de referendumo pri mondfederalismo. Kongreso okazis en 1954 kun la sola temo: „Revizio de la ĉarto de Uno.” La naciaj grupoj interrilatu kun aliaj organizoj (eksperimento pri internacia vivado, mondasocio de gejunuloj, internacia studentmovado por Uno, Esperanto-movado). La movado faru ĉion eblan por interŝanĝo de gejunuloj de diversaj landoj.

Dum la lasta kunsido la kongreso akceptis rezolucion pri Esperanto (laŭ ŝanĝita propono de Universala Ligo): „Estas rekomendate, ke la organizaĵoj-membroj de la Mondmovado por Federacia Mondregistaro kuragigu siajn membrojn kaj precipe siajn delegitojn ĉe la kongresoj, lerni Esperanton.” Iu D-ro A. D. Heller el Britujo proponis komponigi mondfederalistan himnon kaj traduki ĝian tekston en multajn lingvojn, sed oni devus kanti ĝin dum la kongreso nur en Esperanto.

Sveda studento raportis, ke la svedaj mondfederalistoj kaj la esperantistoj starigis kunlaboron. „Ni studentoj devas memori, ke ne ĉiuj homoj povas, kiel ni, malŝpari sian tempon por lerni fremdajn lingvojn. Ĉar Esperanto havas vere efektivan organizon, kunlaboro inter la federalistoj kaj la esperantistoj estas tre valora por ambaŭ movadoj.”

Konferencan de la Eŭropo-federalistoj en Hago (8.-10.10.) partoprenis ankaŭ esperantistaj junuloj (kvar el Lyon, unu el Croix, kaj kredeble pliaj), sed ŝajnas, ke dum la kunvenoj oni ne parolis pri Esperanto.

Se vi deziras informojn pri la mondfederalista movado, skribu multope en Esperanto al: Young World Federalists, Keizersgracht 369, Amsterdam C, Nederlando.

Heroldo de Esperanto

Eldono: *Heroldo de Esperanto*, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.
Aperas principe dufoje monate, sed dum la somera sezono unufoje monate.
Redaktoro: T. Jung. — Jarabono 4. — dolaroj

Oni pagu la kotizon al D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37

Al ĉiu nova abonanto por 1954 ni liveros senpage la numerojn, ankoraŭ aperintajn dum 1953 post ricevo de la nova abono, kaj krom tio, eventuale, 2-3 pli fruajn numerojn. Kiel novan abonanton ni konsideras tiun, kiu ne estis abonanto en 1952 kaj 1953.

Niaj Grupoj

Nov-Jorko

Dimanĉon, la 6an de Septembro, kelkdekoj da Nov-Jorkaj gesamideanoj festis sian lastan piknikon de la somero en la bela arbaro de Inwood Park. De S-ano James D. Sayers ili ricevis raportojn pri la ELNA Kongreso en Madison, kaj de la 38a Universala Kongreso de UEA en Zagreb.

Post dumonata vojaĝo tra Usono, dum kiu li vizitis gesamideanojn en Detroit, Chicago, San Francisco kaj Los Angeles, ankaŭ siajn filinon kaj bofilon en Whittier, California, S-ano Heinz Jung (frato de Teo Jung, eldonisto de *heroldo de esperanto*) ricevis adiaŭan feston je lia honoro de membroj de la Nov-Jorka Esperanto-Societo, je dimanĉo, la 13a de Septembro. S-ano Jung rakontis interesajn anekdotojn pri la plej fruaj tagoj de ESPERANTO TRIUMFONTO, la komenca nomo de la *heroldo*, en 1919-20, kiam li kaj lia fratino helpis sian fraton, Teo, prepari la eldonojn de tiu unua semajna Esperanto-gazeto. Ili ofte devis labori ĝis la fruaj matenaj horoj en la presejo de sia patro por plenumi tiun "am-laboron" por Esperanto.

Alia gasto en la sama kunveno estis juna medicinista studento de la Amerikana Universitato de Beirut, Lebanujo. Faruk Abul Dahab alparolis la grupon pri la juna, rapide kreskanta Esperanta movado en lia malgranda hejmlando, kaj pri la araba lingvo.



Kunveno de Nov-Jorkaj samideanoj. Sub la gazeto: S-ro Jung. Dekstre de li: Faruk Abul Dahab.

Aliaj fremdlandaj vizitantoj, kiujn la ELNA membraro kaj la Nov-Jorka Esperanto-Societo gastigis dum la pasinta somero estis Ges-roj Charles Thollet, el Maroko; Ges-roj Kaarlo Harteva, el Finnlando; kaj S-ro G. F. Makkink, el Wegeningen, Nederlando.

La nova sezono de aŭtuna-vintra agado komenciĝis la 3-an de oktobro en la kunvenejo, studio 843, Carnegie Hall. Iom pli ol 50 gesamideanoj kaj vizitantoj ĉeestis kaj aŭdis raportojn pri la ELNA kaj UEA kongresoj, kaj aplaŭdege ĝuis la violon-muzikon de S-ino Dora Marootian, kies ĉarma

akompanantino per piano estis S-ino Elfriede Tanzen, antaŭe de Wiesbaden, Germanujo. Poste estis vigla diskutado pri proponoj por propagandado kaj instruado. Inter alie, oni decidis provizi ĉe la venonta kunveno, la unuan sabaton de novembro, demonstracian lecionon en Esperanto, kiun donos la Societa Prezidanto, John L. Lewine, kiu estas profesia pedagogo en lingvistiko, membro de la direktoraro de Nov-Jorkaj Lernejoj. Oni speciale invitos ĉiun interesaton pri studado de Esperanto kaj poste arangos klasojn por tiuj kiuj volos studi en klasoj, aŭ rekomendos la korespondan kurson de B.E.A.

Seattle

The summer picnic of "Friends of Esperanto" in Seattle, Wash., was reported in the August issue. Space did not permit inclusion at that time of a photograph showing some of the participants. See photo on this page.

San Francisco

